



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

FELIĈAN JARON 1935

RIMAĴOJ

EL VICENTE ROGLÁ

XXVI

Mi scias poezion de la ŝtono,
Kiu formas grandegajn katedralojn,
Kaj el laĝet' ensorĉe dormetanta
Mi scias poezion de l'kuŝakvo,
Kaj ankaŭ poezion de la ventoj,
Kiam aer' murmuras sian kanton,
Sed el ĉiuj mi amas vin prefere,
Ho dia poezio de la karno!

XXI

En la ĉielan bluan
Siblante la raket' rapide grimpas.
Tiel same vi grimpis rapidege
En bluan de l'animo senagita.

Kial vi fulme brilis
Por lasi ĝin senluma kaj pli nigra?

El hispana lingvo tradukis,
VICENTE INGLADA.

Kristnasko de Poeto

PEDRO ANTONIO DE ALARCÓN.

*En angulo de Andaluzio
estas ridanta valo.*

*Benu ĝin Dio! ĉar tie
miaj amatinoj vivadas kaj
ankaŭ amikoj, gefratoj,
gepatroj.*

Pasis jam multe da jaroj—ĉar tiam mi nur estis sepjara—kiam en vintrotaga eknoktiĝo kaj post preĝado je la tri "Saluton, Mario", ĉe la preĝsonorilado, mia patro diris al mi per serioza voĉo:

—Petro, hodiaŭ nokte vi ne kuŝiĝos samhore, kiam la kokinoj; vi jam estas pli aĝa kaj devas nok-

tomanĝi kun viaj gepatroj kaj gefratoj. La hodiaŭan nokton estas Kristnaska festo.

Neniam mi forgesos la ĝojon, per kiu mi aŭskultis tiujn vortojn.

Mi kuŝiĝos malfrue!

Mi malsate rigardis miajn ceterajn gefratojn pli junajn ol mi, kaj mi ekmeditis la manieron rakonti en la lernejo la sekvantan tagon post Trireĝa festo tiun unuan aventuron, tiun unuan diaboĉon de mia vivado.

Estis jam la "Animoj" (1), kiel oni diras en mia vilaĝo; vilaĝo kuŝanta pli malproksime ol tricent mejlojn de Madrido, pli ol trimil mejlojn de la mondo, en faldaĵo de Sierra Nevada (2).

Ŝajnas al mi, ke ankoraŭ mi vidas vin, gepatroj kaj gefratoj! Dikega, kverka trunko kraketadis meze de la fajrujo; la larĝa kaj nigra kameno varmigis nin; en angulo sidis miaj du avinoj, kiuj dum tia nokto restadis en mia hejmo por prezidi la familian ceremonion; apude sidis miaj gepatroj; poste, ni, kaj inter ni, la geservistoj...

Ĉar dum tia festo ĉiuj ni reprezentis la hejmon, nin ĉiujn devis varmigi sama fajro.

Mi memoras, kiel la servistoj staradis kaj la servistinoj kaŭradis aŭ genusedis sur la planko. Ilia respektplena humileco malpermesis al ili okupi sidilojn.

Gekatoj dormis meze de la rondo, dorse al la fajro. Kelkaj neĝeroj falis tra la kamentubo.—Tra la kobolda vojo!—Kaj la vento siblis malproksime, parolante al ni pri la forestantoj, pri la malriĉuloj, pri la vojirantoj.

Mia patro kaj mia plejaĝa fratino ludis harpojn; mi ilin akompanis—spite ilin—per granda zambomba (3), kiun mi fabrikis dum tiu posttagmezo mem, per rompita kruĉo.

Ĉu vi konas la kantatojn de la "Kristnaskdonacoj", kiujn oni kantas en la orientaj vilaĝoj de Veleta montpinto?

Nu, el tiu muzikaĵo nur konsistis nia koncerto.

La servistinoj prenis sur sin la voĉan parton kaj kantis strofojn kiel jenan:

Hodiaŭ estas Kristnokto
Kaj morgaŭ Kristnaska tag';
Ĉar mi deziras drinkegi
Eltiru vinujon, Manj'.

Kaj ĉio estis amasbruo; ĉio, kontento; rendkukoj, porkgraskukoj, — “a la j ú” (mielkuko), dolĉaĵoj faritaj de la monahinoj, “rosoli” (4), meriza brando cirkulis de mano al mano... kaj oni preparolis iri ĉeesti la meson “de la Koko” je la dekdua nokthoro, tiun de Paŝtistoj, ĉe la tagiĝo fari glaciaĵon per la neĝo tapiŝanta la korton, kaj viziti la statueteran Krisnaskprezenton faritan de ni, la geknaboj, en la turo...

Tuj, meze de tia gajeco, alvenis al miaj oreloj la jena strofo, kantata de mia patra avino:

Kristnaska nokto alvenas,
Kristnaska nokto foriras
Sed foriros ja ni ĉiuj
Kaj revenos ni neniam.

Malgraŭ miaj malmultaj jaroj, tiu strofo frostigis mian koron kaj subite disvolvigis antaŭ miaj okuloj ĉiuj melankoliaj horizontoj de la vivo.

Ĝi estis instinkta ekkonscio nekonvena por mia aĝo; ĝi estis mirakla antaŭseno; ĝi estis fine mia unua inspiro, per kiu mi vidis per mirinda klareco la malgajajn destinojn de tiuj tri generacioj tie ĉeestantaj, el kiuj konsistis mia familio. Tio estas, ke miaj geavoj, miaj gepatroj kaj miaj gefratoj ŝajnis al mi kvazaŭ marŝanta armeo, kies antaŭgvardio eniras jam la tombon, dum ĝia postgvardio ankoraŭ ne eliris el la lulilo.

Kaj tiuj tri generacioj konsistigis jarcenton.

Kaj ĉiuj jarcentoj estos ja egalaj! Kaj la mia malaperos, kiel la aliaj, kiel ĉiuj poste venontaj!...

Kristnaska nokto alvenas...!

Tia estas la neŝanĝigebla unutoneco de la tempo, de la pendolo balanciganta en la spaco...

Terura ideo, kruelela sentenco, kies nedubiga klareco estis por mi kvazaŭ la unua avizo donata de la morto, kvazaŭ la unua gesto, kiun ĝi al mi faras el la estonteca duonombro!

Tiam paradmarŝis antaŭ miaj okuloj miloj da pasintaj Kristnaskoj, miloj da estingiĝintaj fajrujoj, miloj da familioj, kiuj noktomanĝis kune kaj kiuj jam ne plu ekzistas, kaj ankaŭ; aliaj infanoj, aliaj gajecoj, aliaj por ĉiam perditaj kantoj, la amoj de miaj avinoj, iliaj jam ne uzataj vestaĵoj, ilia malproksima juneco, la memoroj tiamomente ilin sieĝantaj, la infan tempo de miaj gepatroj, la unua Kristnasko de mia familio, ĉiuj feliĉaĵoj de mia hejmo, antaŭaj al miaj sep jaroj... Kaj post mi mi divenis la senhaltan, la senĉesan marŝadon de mil Kristnaskoj pluaj periode venontaj, forrabantaj al mi vivon kaj esperon, de estontaj gajaĵoj, en kiuj patroprenos neniu el ni, la tie ĉeestantoj, de miaj gefratoj disrintaj tra la mondo, de miaj gepatroj sendube mortontaj, antaŭ ol ni, kaj mi vidis nin solaj en la vivo; la 19-an jarcenton anstataŭita de la 20-a jarcento; tiujn fajrajn karbojn devenintaj cindro; mian Junecon vaporiginta, mian malJunecon, mian entombigon, mian postmortan memoron, la forgeson pri mi, la indiferentecon, la nedankecon, kun kiu miaj genepoj vivos el mia sango, ridos kaj ĝuos, ĉar tiam mi ekkomprenis hele ĉiujn ĉi pensojn.

Rivero da larmoj fluis el miaj okuloj. Oni demandis al mi, kial mi ploras; kaj, ĉar mi mem ne tion sciis, ĉar mi ne povis klare distingi, ĉar neniel mi estus povinta tion komprenigi, oni interpretis, ke mi deziris dormi kaj oni ordonis al mi enlitiĝi.

Mi ploris do, denove, pro tia kaŭzo kaj tiel kune fluis miaj unuaj filozofiaj larmoj kaj miaj lastaj,

infanaj larmoj, kaj mi nun povas certigi, ke tiu maldorma nokto, dum kiu mi aŭdis de la lito la ĝojan bruon de noktomanĝo, kiun mi ne ĉeestis, pro tio ke mi estis tro infana (laŭ oni kredis tiam) aŭ pro tio ke mi estis tro plenkreska (laŭ mi konjektas nun) estis iu el plej malĝojaj el mia vivo...

Fine sendube mi ekdormis, ĉar mi ne memoras ĉu restis nur projekte la iro en Kok-Meson, en tiun de Paŝtistoj kaj la intencita glaciaĵo.

Tradukis el la hispana
AMALIA NUÑEZ.

Pamplona.

(1) “La Animoj”. Sonorilado en katolikaj preĝejoj ĉe la eknoktiĝo. La koncerna horo.

(2) “Sierra Nevada”. (Negata Montaro) plej alta, hispana montaro apud Granada.

(3) Zambomba. Kamparana bruigilo farita per streĉita membrano sur vazbuŝo kun hirta stangeo, kiun oni frotas.

(4) Rosoli. Trinkajaĵo el alkoholo, sukero, cinamo kaj anizo.

Ni oftigu niajn festojn

En niaj festoj oni laboras kaj preparolas praktikajn demandojn pri Esperanto, kaj dum la tuta jaro ankaŭ ni laboras, kaj al ili nia lingvo ŝuldas, ke ĝi havas nun parolan tradicion, kio estas grava kondiĉo de vivo. Sed de pli ĝenerala vidpunkto niaj festoj estas ne nur okazo por laboro, interparolado kaj ĝojo: ili estas antaŭ ĉio, manifestadoj de la entuziasma kaj sentimentala flanko de nia afero. Sen tiu partopreno de entuziasmo nenia homara movado povis sukcesi, ĉar al ĝi mankas ĉefa movilo. La venko de la movado dependas de la agado de diversaj fortoj: entuziasmo estas unu el ili; ĝi estas potenca forto de unuemo, de kredo kaj solidareco. Sen ĝi kristanismo kaj liberalismo neniam estus venkintaj, kaj Esperanto neniam estus trapasinta la malĝojajn tagojn de la komenca; sen tiu sento de solidareco ĝi neniam estus evitinta danĝerajn rifojn; sen ĝi ankaŭ ni neniam atingos la finon de nia entrepreno. En niaj festoj, en iliaj diversaj elmontriĝoj grupigite sub nia flago, kantante nian himnon, ni konscias, ke Esperanto ekzistas, ke ĉe la esperantistoj estas komuna ne nur la lingvo, sed multaj aliaj ligiloj, kiujn kreis la lingvo. Tiun ĉi komunan senton de samideaneco ne ĉiu homo povas kompreni en sia kabineto aŭ laborejo, sed ĉe niaj festoj ĉiu, de kie ajn li venas, konscias pri ĝia ekzisto, kaj same, kiel en la kongresoj, ĝi aperas en la pli modestaj festoj, kiuj estas kvazaŭ ilia antaŭparolo.

Ni zorge konservu al niaj festoj tian spontanegan, entuziasman, ĉarman karakteron, kian ili ĝis nun havis; ni respektu en ili rebrilon de tiu forto, kiu unuigas kaj fratigas; ni penu, ke ili estu ĉiam simplaj, koraj, sen tiu oficialeco kaj ekstera trudo, kiuj detruus ilian agrablecon. Aliparte, ĉar unu el iliaj celoj estas fari publikan manifestadon por Esperanto kaj plimultigi la ligilojn inter samideanoj, estus dezirinde, ke tiaj festoj okazu pli ofte. Granda estas impresio, kiu rezultas el la vidaĵo de tiu vere neŭtrala festo en la honoro de la Esperantismo, de festo, en kiu partoprenas homoj de ĉiaj sociaj klasoj unuigitaj sur la neŭtrala kampo de la Esperantismo.

M. C. B.

K O R O

Kiam ŝi eniris la ĉambron, la klaso jam estis komencita.

—Bonan vesperon!—ŝi diris, alproksimigante sian sidilon.

La klaso estis okupata per legado kaj tradukado je franca kaj patra lingvoj. Ŝi malfermis la libron kaj trovis la paĝon, laŭ kiu oni legis.

En la ĉambro sidis tridek gejunuloj kaj antaŭ la nigra tabulo staris la altkreska, bela, nigrehara instruisto kun helaj grandaj okuloj.

Ŝi ŝtelrigardis la gekamaradojn unu post la alia. Ĉiuj aspektis atenti la legadon. Ŝia rigardo atingis la instruiston, kaj samtempe lia rigardo lasis la libron. Iliaj okuloj renkontis sin reciproke, sed nur dum mallonga momento. Ŝi ruĝiĝis kaj tuj mallevis sian vidon. Kutime dum la lecionoj ŝi estis gaja kaj petolema. Ofte ŝi kaŝflustris spritaĵon al kamarado aŭ per mimikaĵo aŭ rideto ridigis iun: Tiam ŝi ĉiam renkontis la sercecan rigardon kaj preskaŭ nevideblan rideton de la instruisto, pri kiu, ŝi kredis, estis reciproka sinkompreno, kvankam oficiale estis kvazaŭ riproĉo.

Ho! kiel ŝi amas tiun rideton. Ŝia petolemo estas nur por aperigi tiun rideton en liaj lipoj.

Sed hodiaŭ ŝi ne emas ŝerci, ŝi nur sentas pesimismen kaj malĝojon.

—Kiel mi fartas hodiaŭ? — ŝi demandis sin mem—Kial tiu ĉi malĝojo?

Ŝi penas atenti la legadon, sed malsukcesas.

—Kial mi venis ĉi tien hodiaŭ?

Sed ŝi promesis sin mem, ke hodiaŭ estas la lasta fojo.

—Bonvolu daŭrigi—ekdiris la instruisto.

Ŝia pensado subite rompiĝis pro lia belsona voĉo. Ho! ŝi estas en la vico laŭte legi. Ŝi ne atentis kaj ne scias, pri kio oni legas. Ŝi embarasiĝis kaj nevole obstinis.

—Mi ne volas legi—ŝi diris sin mem.

Eble la instruisto komprenis ŝian mienon.

—Kial? Ho, jes...—li diris afable, ŝovante la libron antaŭ ŝin kaj montrante la paĝon, laŭ kiu oni legis.

Ŝi sentis la rigardojn de la ceteraj sur ŝin kaj hontis. Tutplena silento kaj streĉeco regis en la ĉambro. Ŝi sentis, kiel ŝiaj vangoj pli kaj pli ruĝiĝis kaj subite ŝi stariĝis kaj obstine, fiere lasis la ĉambron.

Ekster la pordo staris iliaj skioj, ŝi serĉis la siajn kaj rapide submetis ilin. Ŝiaj okuloj estis plenaj je larmoj.

—For, for de tie ĉi—ŝi ekkriis—nun ĉio estas finita.

—Sed pli bone estas—ŝi daŭrigis—ne plu veni ĉi tien, ol vivadi tiel. Kia sufero, kia mordetanta sopirado!...

Kiel ŝi ĉiutage revis kaj nokte ploris! Ho, kiel ŝi amas lin, tiun belkreskan instruiston!

Ŝi memoras nun la unuan tempon de ilia konatiĝo: Ĉarmaj ridetoj, karesaj rigardoj, varmaj manprenoj... Kiel ŝia koro batis, kiam li akompanis ŝin hejmen. Tiam ŝi estis feliĉa. Sed nun... ne plu! Nerompebla barilo stariĝis inter ili.

Ŝi kuris laŭ freneza rapideco tra la lunluma arbaro. Ĉio estis silenta ĉirkaŭ ŝi: oni nur aŭdis la klakfrapetadon de la skioj...

Ŝajnis kvazaŭ ili dirus al ŝi: for!... for!... for!...

Ŝi nur kuris kaj kuris...

Ŝi ne sciis certe, kiom daŭre ŝi kuris, kiam ŝi

ekhaltis, demetis siajn skiojn kaj ĵetis sin antaŭen sur la neĝon kaj ploris, ploris korsirite.

—Finita! finita!—ŝi ekkriis ĉagrene. Sed iom post iom la ploro mallaŭtiĝis kaj fine ĉesis.

Kial mi ploras?—ŝi sin demandis laŭte. La voĉo sonis tiel akre, ke ĝi preskaŭ timiĝis ŝin.

Ŝi sidiĝis sur falinta trunko kaj sentis, ke ŝi estas laca, morte laca. Kvankam ŝi estis noktomeze tute sola en la arbaro, ŝi tamen ne sentis timon. Antaŭ ŝi etendiĝis belega, trankvila vidaĵo. Ĉie la blanka, mola neĝo. Ŝi amis la puran neĝon, la majestatan arbaron, la sanigan, freŝan aeron...

Ŝi rigardis supren. Sur la ĉielo la steloj afable palpebrumis al ŝi. Kaj ŝi imagis, ke la ronda kaj flava luno al ŝi ridetis glorie.

Nun ŝi iomete trankviliĝis, ne plu doloris tiel terure ŝia animo, sed interne ŝi sentas sin malplena kaj apatia.

—Kruela sorto!—ŝi plendis.

Sed subite ŝiaj trajtoj ŝanĝiĝis. Ekaperis al ŝia interna vido pala vizaĝo de knabineto, kiun ŝi foje vizitis.

—Kial mi plendas?—ŝi diris pensante pri la knabineto, kiu dum kelkaj jaroj kuŝis malsana.

Ŝi hontis, pro tio ke tiu knabineto, kvankam ofte havis fortajn dolorojn, neniam aŭdigis siajn plendojn. Kiom multe pli, ol ŝi, certe suferis la kompatinda knabineto!

—Heroa karulineto—ŝi murmuris—ankaŭ mi volas porti mian sorton, kiel heroo.

Ŝi lleviĝis por ekiri hejmen, sed nun kuris malrapide; estis kvazaŭ la kruroj ne volus porti ŝin. Ŝi estis laca korpe kaj anime. Ĉio nun estis indiferenta, ŝi ja devas returni kaj daŭrigi la postulantajn kaj tedajn vivadon.

—Ĉu iam la vivo aspektos por mi ĝojiga kaj bela?—ŝi pensis kun eta, malĝoja rideto. Vere ŝi forte dubis pri tio. Tamen ŝi sentis pli da forto por renkonti la eblajn, plurajn sortobatojn.

X. X. X.

S P R I T A Ĵ O J

En literaturista klubo oni parolas pri neĉes-tantaj kamaradoj kaj, kompreneble, oni mallaŭdas ilin. Nun estas sur la *sekcitablo* gazetisto M. R.

—Li estas el tiuj personoj, kiuj sin mem aŭskultas, kiam ili parolas—oni diras.

Kaj poeto K. P. rimarkigas trafe:

—Do mi jam komprenas, kial li ĉiam aspektas tiel tedite.

* * *

La vagonaro haltas subite kun terura grincado de siaj bremsoj. Junulo malgajmiena eligas sian kapon tra vagonfenestro kaj demandas:

—Kio okazas? Ĉu akcidento?

—Ne; iu funkciigis la alarmobremson kaj pro la subita ekhalto la lasta vagono elreliĝis. Ni restos ĉi tie almenaŭ du horojn.

—Kia demaĝo! Kaj mi, kiu devas edziĝi ĉi tiun posttagmezon mem!...

Aŭdinte tion ĉi la maŝinisto turniĝas rapide al la junulo:

—Nu!—li demandas al li suspekteleplene—Ĉu vi mem ne estas, kiu funkciigis la bremsan?

* * *

—Nu! Ĉu tiel frue vi lasas min, Alfredo?

—Karulino; mi donus dek milionojn por povi resti kun vi unu pluan horon; sed, se mi malfrue alvenos en la kunsidon, miaj kamaradoj punos min per du pesetoj.

* * *

Viro unuafoje sidas por fiŝcapti per kano. Dum du horoj li sukcesis kapti nek eĉ fiŝeton.

Li ŝanĝis kelkefoje la fiŝallogaĵon kaj fine metis iun, kiun li konsideris nepre sukcesiga. Ĉar malgraŭ tio la fiŝoj ne aliris por manĝi ĝin, li stariĝis kaj, jetante moneron al ili, li tre trankvile diris:

—Nu! Ĉu tio ankaŭ ne plaĉas vin? Do jen duonpeseto, por ke vi aĉetu, kion vi volos.

* * *

Post kelkaj horoj, dum kiuj ebriulo punrestis sen libero, oni liberigas lin fine.

—Adiaŭ!—diris al li la poliestro—Kaj mi esperas ne plu vidi vin tie ĉi.

—Kial? Ĉu vi jam ne plu plenumos ĉi tiun postenon?

SCIIGOJ

La pasintan monaton Decembro edziniĝis en Zaragozo nia samideanino Irma Maynar, filino de la kara Honorprezidanto de Frateco Sro. Maynar, kun Sro. Cruz Pérez, klera advokato de nia urbo.

NIA VIVO je la nomo de Frateco tutkore gratulas la feliĉan paron kaj deziras al ĝi ĉiuspecajn ĝojojn kaj prosperojn en sia nova stato.

* * *

En la 5-a Internacia Spiritista Kongreso okazinta en Barcelono de la 1-a ĝis la 10-a de la pasinta Septembro oni decidis rekomendi al la tutmonda spiritistaro la lernadon kaj uzadon je nia helplingvo.

Ni gratulas la spiritistojn pro ĉi tiu saĝa, trafa kaj imitinda decido, kiu liveros al ilia movado, se ili reale ĝin efektivas, la interkomprenon kaj unuiĝon nepre necesajn por ĉiuj internaciaj, idealaj aŭ praktikaj aferoj.

* * *

Unuafoje en Alkojo (Alcoy) oni festis la Zamenhofan tagon. Kun granda sukceso la alkojaj samideanoj malfermis ekspozicion, vendante samtempe multajn librojn, gramatikojn kaj vortarojn. La ekspozicio estis tre vizitata.

Oni povas certigi, ke en Alkojo Esperanto triumfas. La entuziasmo kaj fervoro de niaj tieaj samlingvanoj estas ja ega.

Nian varman gratulon, kaj antaŭen ĝis la fina venko!

* * *

Ni memorigas la Fratecinojn, pri tio ke la 27-an de la nuna monato januaro (lasta dimanĉo de la monato) okazos la ĉiujara ĝeneralkunsido de la Societo laŭ ĝia publikigita regularo.

* * *

La 2-an de la nuna januaro de 9'15-10, vespere, okazos eksterordinara esperanto-radiodissendo el Ĉeĥoslovakujo, kies ĉefan stacion Praha (470'2

m.; 120 kv.) oni aŭdas tre bone de nia lando. La radiaĵo konsistos el duonopero "Sternite sur Rozoj" treege sukcesanta en Ĉeĥoslovakujo.

Certe ĝia aŭdado, kiel tiuj de la antaŭaj monatoj liveros al la radio-esperantistoj multe da ĝojo kaj ĝuo.

Pro ilia granda sukceso oni intencas plioftigi tiajn dissendojn.

Skribu amase gratulante ilin (Radiojurnal Brno-Kounicova 44—Brno—Ĉeĥoslovakujo).

PENSOJ

Senpacienulo ne ŝatas silenton.

(Sankta Efreno).

Ĉiu, kiu bone parolas kaj malbone agas, vidas sin ligita per siaj propraj vortoj kaj kondamnita per sia propra kondamno.

(Sankta Eŭgeno).

Kiu pardonas insulton, tiu devigas sian malamikon insulti sin mem.

(Filemon).

En la historio de kreitaro cent milionoj da jaroj forpasas, kiel unu sola tago; ili sin forŝovas kaj malaperas, kiel flugema songo en la internon de ĉion ensorbanta eterneco.

(Flammarion).

La edzo, kiu ofte montras sian edzinon kaj sian; monujon, riskas, ke oni ilin pruntepetu.

(Franklin).

Estas same malfacile por riĉuloj akiri saĝecon kiel por saĝuloj akiri riĉecon.

(Epictetes).

Ne ridu longedaŭre, nek ofte, nek troe.

(La sama).

Kiam ni estas kun amiko, ni estas nek solaj, nek du.

(Barthelemy).

Kiuj malŝatas virinon, ne komprenas ŝin.

(Basora).

La profunda studo pri modoj estas la literaturo ĉe virinoj.

(Beauchene).

Imitado ĉiam supozigas malsuperan talenton en imitanto.

(Bello).

Virino estas kunmiksaĵo de singardemo kaj malsingardemo, de virto kaj malvirto, de boneco kaj kolero, de ambicio kaj malavareco, de malforteco kaj forteco.

(Bescherelle).

Esti viro sufiĉas por fariĝi bona patro, sed estas necese esti bonulo por fariĝi bona filo.

(Blanchard).

Estas pli da nobleco kaj animgrandeco ĉe pardono, ol ĉe sinvenĝo.

(La sama).